

La eldonado de tiu bulteno estis elpensita de Registrolibra estraro en junio 2004, unue por plifluigi la agadraportojn de la Registrocentroj dum Ĝenerala Asembleo de Mondcivitana Registrolibro, kaj por ebligi Registrocentrojn kaj Korespondantojn interrilatiĝi, konsistigi retojn, kaj fine ni malfermis niajn paĝojn al la komisiono pri tutmondiĝoj.

Tiu numero plenumas tiujn kondiĉojn kaj interalie ĝi utilis kiel referenca dokumento dum la ĝenerala asembleo de la 5a de marto 2006.

Kiel frontartikolo, ĉi-apude, vi trovos tekston, kiu estis sendita al ni, je nia granda surprizo, de itala mondciĉitano, kies spuron ni estis perdiĝintaj. La Profesoro Francesco Proietti Ricci, prezidanto de la Internacia Ligo de Homaj Rajtoj por Italio, konis kaj kunlaboris kun Enrico Dacco, nia bedaŭrata Direktoro de la Itala Mondcivitana Registrocentro. Profesoro Francesco Proietti Ricci estis en la jaroj 1970 respondecanto de la loka mondciĉitana registrocentro en Piemonto (regiono de Torino).

Manke de tradukanto itala francen, la mesaĝo kaj la teksto estis tradukitaj en Esperanton de Johano-Karlo Rinaldi (por la mesaĝo) kaj de Ursula Grattapaglia (por la teksto). Ni dankas ilin.

La estraro

La bulteno RECIM-Mondo estas adresata :

- Ø Al la Mondcivitanaĵoj Registrocentroj kaj al la Registrolibraĵoj Korespondantoj ;
- Ø Al la Kongreso de la Popoloj ;
- Ø Al kelkaj tutmondiĝintaj urboj kaj komunumoj ;
- Ø Al kelkaj organizaĵoj, kiuj klare elektis tutmondisman vojon.

Enhavo

Inter utopio kaj revizio.....	p. 1
UNESKO.....	p. 2
WUPED 2005.....	p. 2
Listo de Centroj kaj Korespondantoj.....	p. 3
Novaĵoj el la Centroj.....	p. 4
Novaĵoj el la Korespondantoj.....	p. 5
Mondcivitanecca tago.....	p. 6
Komisiono pri tutmondiĝoj.....	p. 7
Stabroek, tutmondiĝinta urbo.....	p. 8
Kelkaj sugestoj.....	p. 8
Seminarioj de Tutmondismaj Studoj.....	p. 9
STS en Benino.....	p. 10
Kalendaro.....	p. 10

Inter utopio kaj revizio de la ĉarto de UN

Mondcivitanecco ne estas utopio. Utopiaĵoj estis la respubliko de Platono, la urbo de Dio de Sankta Agostino, la monarkio de Dante, la suna urbo de Campanella, la neekzistanta insulo nomita utopio de la ideo respubliko de Tomas Moro, la daŭra paco de Kant, tamen kiel grandan kontribuon donis tiuj verkoj al la politika kaj socia ordo de la homaro!

Multaj homoj havis la intuicion ke la universala Paco povus ekzisti nur per la unuiĝo de la mondo sub unika monda aŭtoritato, sub unu nura leĝo! Tiel pensis ekzemple Dante, Napoleone; sed kiu estus devinta dikti ĝin? Tiu leĝo devas esti diktita kaj volita **ne** de la plej bona homo, **ne** de la plej bona popolo sed de ĉiuj popoloj.

La plej grandaj pensuloj de la homaro kaj de ĉiuj tempoj jam parolis pri la neceso de monda aŭtoritato por atingi la Pacon inter la popoloj; tiel ke eĉ Isaia profetis ke iam ĉiuj popoloj de la mondo estos unuiĝintaj en Paco. Demokrito asertis ke “La patrujo de la inteligenta homo estas la mondo”; Sokrato diris...” se iu vin demandas de kie vi venas ne diru ke vi estas de Korinto aŭ de Ateno sed respondu: mi estas mondciĉitano”.

Sekve multaj aliaj homoj diris al ni - kvankam sub diferencaĵoj influoj de propraj ideoj kaj de propraj temoj - ke la homaro povos havi Pacon kaj bonfaron nur per monda aŭtoritato sur la bazo de egaleco, de frateco kaj libereco, garantiataj de la ne-perforto, de la logika kohereco kaj de la toleremo; mi citas kelkajn Zenone de Cizio, Cristo, Sankta Agostino, Tomas Moore, Campanella, Voltaire, Rousseau, Gandhi, Einstein, Schweitzer, Oppenheimer, Kant.

La racia kialo kiu devas instigi nin proklami la mondciĉitanecon estas nia konvinko, ke la nura kaj unika sistemo por elimini militojn inter la popoloj, estas la rajto esti protektata de monda aŭtoritato kaj al kiu ni havas la devon obei, tiamaniere limigante al la unuopa popolo la propran suverenecon tiakvante kia necesas kaj estos sufiĉa por elimini la bezonon de perforto.

Kaj jen tiel ni povas aserti ke kun la grandaj pensuloj de ĉiuj tempoj ni povas diri, ke ne ekzistas aliaj iloj, aliaj sistemoj ol la monda registaro kiu povos liberigi nin de militoj kiuj de miljaroj iĝas ĉiam pli kruelaj.

Nun ni nin demandas : ĉu la popoloj, sen diferencigo, toleros ankoraŭ la ruinojn kaj la krimojn de la militoj? Mi ne kredas. Venis la momento ke ili per sia suverenecco kaj en plena libereco decidus superi ĉiujn egoismojn kaj sin deklaras pretaj por akcepti kaj voli la mondciĉitanecon en la certeco ke ĉiuj akiros la plej grandan privilegion : vivi en Paco.

Kial ne memori ke en la Itala Konstitucio, en la artikolo 11 estas dirite kiel sekvas: “Italio rifuzas la militon kiel instrumenton de ofendo al la libereco de aliaj popoloj kaj kiel ilon por solvi internaciajn malsamajn opiniojn; konsentas en egalrajtaj kondiĉoj kaj kun la aliaj ŝtatoj akceptas la limigojn de la suverenecco necesaj por garantii Pacon kaj Justecon inter la nacioj; apogas kaj favoras la internaciajn organizaĵojn kiuj laboras tiucele.”

Konsiderante ke la progreso de la scienco kaj tekniko, malgrandigante la distancojn kaj alproksimigante la homojn, igis la Teron senfine malgranda, permesis la forigon de malnovaj historiaj konceptoj vid-al-vide de novaj idealoj kaj de novaj realaĵoj.

Hodiaŭ la katastrofa politiko de antagonismoj kondukis al malamo, al sentoleremo, al la divido, al la kresko de armiloj, al terorismo, al la milito.

En 1948 en Parizo oni proklamis la neceson forigi la landlimojn, la naciajn suverenecojn, kreante pere de liberaj kaj demokrataj elektoj, registarojn dediĉitajn al la monda unueco. Superante la fermitan naciismon ni estus liberaj homoj; antaŭ la tragedio de la milito kaj de la terorismo ni nin deklaras Pacaj homoj; kredante en la realigo de pli bona mondo en kiu ĉiu energio estu nure elspezata ne por la detruo kaj la morto, sed por la vivo kaj la bonfarto, tiam ni estos serenaj homoj.

Ĝis hodiaŭ la Unuiĝintaj Nacioj estis ofte senpova rigardanto de sangoplenaj konfliktoj kaj de spektaklaj invadoj kaj **pro tio ni hodiaŭ lumigu flamon kiu nutranke sin proklamu la principon de la revizio de la Ĉarto de U.N.** por ke ĝi estu konformigota al la novaj historiaj necesoj kaj al la deziro de frateco de ĉiuj popoloj.

Francesco Proietti Ricci

Esperantigita de Ursula Grattapaglia. La titolon donis Daniel Durand

UNESKO

Mondcivitana Registrolibro estis dum multaj jaroj membro de la Komitato de NŜO ĉe UNESKO. Sed post la reformo de la reguloj de partoprenado de NŜO por esti reakceptita, necesis ke Registrolibro provizu dosieron, kiu pruvu, ke Registrolibro estas fakte « internacia » organizaĵo pleniganta la novajn normojn deciditajn de la Ĝenerala Asembleo. Tiu dosiero estis duekzemplere alportita en decembro 2004. En aŭgusto 2005, ĉar neniu respondo estis farita, la Prezidanto provis pli informiĝi. Li iris surloken, kaj tie oni eksplikis al li, ke la oficistino taskita por la studado de la kandidatiĝaj dosieroj estas delokita en Dakaron, kaj ke ŝia anstataŭanto multe penis por elturniĝi meze de pluraj centoj da dosieroj. Aldonu al tio, ke la aproba komisiono kunsidas nur ĉiun sesan monaton ! Nu oni lasis nin esperi, ke la komisiono decidus pri nia realiĝa peto dum la kunsido de printempo 2006. Pacienca !

Lucknow (Hindio) En la freŝdata bulteno RECIInfo, ni anoncis, ke Mondcivitana Registrolibro implikiĝis kun FTUPE / WUPED (Fako por Tutmonda Unuigo kaj por Pac-Edukado) (World Unity and Peace Education Department). En 2004 Liliane Metz-Krencker insistis por ke FTUPE provu eliri el sia nesto tralanĉante ampleksan agadon por antaŭenpuŝi la noción de tutmonda unueco kaj la supernaciajn instituciojn necesajn por la bona regado de nia mondo. La kunveno 2005 iris en tiu senco, kaj jen ĉi poste la konkludoj de la tutmondista simpozio pri tio :

Al nova monda ordo

Al nova monda ordo :

1. La Monda Simpozio en 2005 esprimiĝis per deklaro destinata por starigi agadan planon ligitan al la kreado de grupo nomita « Tralanĉo-2007 » kiu ellaboros agendon de regiona partnereco (RPA).
2. En 2006, 15 regionaj Centroj stariĝos, kiuj laboros laŭ la RPA kaj aranĝos kunvenojn ĉirkaŭ la tuta planedo (2006-2007).

Referenca dokumento estos eldonita pri la konceptoj kaj bazaj metodoj de la agado de la civila socio. Tiu dokumento nomiĝos « Agendo de monda partnereco ». Ĝi evoluos dum la diversaj regionaj kunvenoj por helpi en la solvado de la regionaj kaj mondaj problemoj.

Ni invitas ĉiujn organizaĵojn por lanĉi regionajn iniciatojn kaj por prezenti proponojn en la 15 jenaj mondaj regionoj : 1. Orienta kaj meza Afriko, 2. Suda Afriko, 3. Okcidenta Afriko, 4. Suda kaj Kariba Ameriko, 5. Norda Ameriko, 6. Suda Azio, 7. Pacifika regiono, 8. Sudorienta Azio, 9. Nordorienta Azio, 10. Meza Azio, 11. Okcidenta Azio, 12. novaj sendependaj ŝtatoj de orienta Eŭropo, 13. Kaŭkazaj ŝtatoj, 14. Balkanaj ŝtatoj, 15. Okcidenta kaj Norda Eŭropo.

3. La regionaj kunvenoj celos akceptigi la agendon de monda partnereco. Poste ĝenerala agadplano estos preparita kaj prezentita al la Sekretario de Unuiĝinta Naciaro, al ĉiuj ŝtatestroj kaj al ĉiuj registaroj kun petdokumento por peti la kunvokadon de monda kunveno.
4. Tiu monda kunveno devos sin apogi sur la artikolo 109 de la UN-ĉarto kaj ebligos pli gravan engaĝiĝon de la civila socio. La ĝenerala agadplano devos estis akceptita de ĉiuj registaroj, transnaciaj societoj, civila socio kaj individuoj. Ni esperas, ke ni povos okazigi tiun kunvenon en januaro ĝis marto 2008.

« Tralanĉo 2007 »

Por instali vivteneblan estontecon ni devas ŝanĝi nian pensmanieron. Morgaŭ dependas de tio, kion ni pensas hodiaŭ. La grupo « Tralanĉo 2007 » konsistas el aktivaj kaj entuziasmoplenaj pensuloj, kiuj renkontiĝis en decembro 2005 en Hindio en Lucknow, kaj kiuj dank'al siaj kunordigaj kaj interrilatigaj klopodoj dediĉos sin por vekti la planedan konsciencan.

Tiuj, kiuj deziras aliĝi al tiu grupo povas tion fari per registriĝo sur la ttt-ejo : www.gpwd.org.

La grupo « Tralanĉo 2007 » plinombriĝos kaj disiĝos ĉirkaŭ la tuta tero kaj helpos en la starigo de monda publika opinio kaj en kunordigita agado por konstrui pacan unuiĝintan mondon, kaj justan mondan ordon.

La grupo « tralanĉo-2007 » alvokos ĉiujn regnojn kaj ties enloĝantojn por ke ili adoptu kaj evoluigu mondan leĝaron por fari specifajn kontrolojn pri la respekto kaj plenumo de la decidoj faritaj por detruo la atomajn armilojn.

Dum unu semajno, 108 organizaĵoj el 42 landoj aliĝis al tiuj du projektoj.

La laborgrupoj dum la simpozio de Lucknow :

1. Krei vivteneblan mondon kaj renovigeblajn energiojn por estonteco ;
2. Difini la strukturon de monda parlamento ;
3. Difini seriozan edukadon ;
4. Plifortigi planedan partnerecon por starigi mondan demokration

Liliane Metz-Krencker

CENTROJ KAJ KORESPONDANTOJ

Por helpi ĝin en ĝia tasko, Registrolibro de Mondcivitanoj instalas aŭ rajtigas
Registrocenrojn kaj Korespondantojn.

Albanio :

s Adriana GJIKA, Universiteti Teknologjik,
Rr "S.Zotaj", Pall 1175, VLORE.
? adigjika@yahoo.com

Alĝerio :

s Khemisti BECHAIRIA,
BP 1529, DZ 41000 SOUK AHRAS
? bkhemisti1@yahoo.fr

s Amel DJEMAI , Cité HLM,
Place des Martyrs, Bt.B.n°8,
DZ 42100 CHERCHELL/TIPAZA

Germanio :

s Barthold OLBERS, c/o Myslik,
Spliedtring, 49, DE 22119 HAMBURG
? clubalternative@hamburg.de

s Inge GRZYB, Fröbelstrasse 6,
DE 39110 MAGDEBURG
? ingegrzyb@planet.ms

Andoro :

s Joseph Lluís ORTEGA MATAS
Av.Rocafort, 2 SANT JULIA DE LORIA
? jllortega@andorra.ad

Argentino :

s Nevenka CALVO KUCHAN
Colon 1184 - 5° 13
AR 7600 MAL DEL PLATA
? nevenka@lacasilla.com.ar

Aŭstralio :

s Christopher HAMER,
34 Caravan Head Road,
OYSTER BAY, NSW 2225
? cjh@phys.unsw.edu.au

Belgio :

s Jean VERSTRAETEN,
65 Vredestraat, BE 2540 HOVE
? verstraeten.jean@belgacom.net

Benino :

s Anicet Laurent QUENUM, 07
BP 114 Sainte Rita, COTONOU
? laurentquenum@yahoo.fr

s Patrice LOVESSE, CBDIBA,
BP 256, BOHICON
? cbdiba@intnet.bj

Brazilo :

s Ursula GRATTAPAGLIA, CP 37,
BR 73.770-000 ALTA PARAISO GO
? Bonaespero@aol.com

Bulgario :

s Ivanka STOYANOVA
P.K. 701
BG 9000 VARNA
? ivanka_esperanto@abv.bg

Burkinio :

s Citoyens du Monde, pa/ CAFES,
01 BP 6368, OUAGADOUGOU 01.
? drabo63@hotmail.com

Kamerunio :

s David FONCHO,
pa/ Pr Chindji Kouleu, BP 1803 YAOUNDE
? fodavid@yahoo.ca

Kanado :

s World Citizens, Dorothea F.M.SHEASBY,
688 Green Meadow Crescent,
MISSISSAUGA, ONTARIO L5A 2V2
? dorsheca@hotmail.com

Kongio (République Démocratique)

s Elvis MBIYA TEKADIOMONA,
126Bis, Avenue Mobutu,
BP 267 Mbanza-Ngungu, Bas-Congo.
? aavolar@yahoo.fr

s Urbain KAPOKO SUMAILI,
KINDU Maniema
BP 78, GISENYI, (Rwanda)
? lesamisedesmondutu@yahoo.fr

s Citoyens du Monde, pa/ Sheta Mikayeleye,
BP 51, KINSHASA - Limete
? sheta@voila.fr

s Citoyens du Monde,
Kalonge (Sud-Kivu) pa/ SMAE,
BP 470, CYANGUGU (Rwanda)
? corneillemasirika@yahoo.fr

Kongolando :

s Jean Pierre BERRI,
BP 984, BRAZZAVILLE,

Eburio :

s DIARRA BAKOROBA, s/c Mme Delon,
BP 1513 YAMOOUSSOUKRO

Kroatio

s Mato ŠPEKULJAK
Oštarijska 8 HR 10000 ZAGREB
? humanitas@post.t-com.hr

Hispanio :

s Fernando ELENA DIAZ
c/.Herradura, 58 Bajo, ES 45200 ILLESCAS
? ferelena@eresmas.com

Francio :

s Citoyens du Monde, 15 rue Victor Duruy,
FR 75015 PARIS

Gabono :

s Gervais Truffault M'BITA,
B.P. 4846, LIBREVILLE

Ganao :

s Karl A.Y. KPODO,
P.O. Box 6289, ACCRA-NORTH
? karlkpodo@yahoo.com

Britio :

s John ROBERTS 19 White Horses Way
LITTLEHAMPTON -
West Sussex BN17 6NH
? jrwhw19@tiscali.co.uk

Haitio :

s Michelet MICHEL,
B.P. 15096, HT 6140 PETION-VILLE
? correspondantrcm_haiti@yahoo.fr

Hindio :

s Leo REBELLO, 28/552 Samata Nagar,
Kandivli East, IN 400101 MUMBAI
? leorebello@vsnl.com

Irlando :

s Florence CUSSON, 10 Cuala Road,
BRAY, Co Wicklow
? cussionflo@eircom.net

Italio :

s Giancarlo RINALDO, Via Savonarola 65,
IT 35137 PADOVA
? esperanto.pd@libero.it

Japano :

s Masaji IE, 1.2.17 Suzurendai,
Kitimachi Kita Ku, JP 651 11 KOBE
? sueyoshi@tezukayama-u.ac.jp

Malagasio :

s RAKOTOHASIMBOLA Livah, Lot IVF 98,
Behoririka, ANTANANARIVO
? livaliha@yahoo.fr

Malio :

s Moussa DENA,
BP 1657, BAMAKO
? moussadena@yahoo.fr

Pakistano :

s Imran Yousuf MUHAMMAD, F-13/32,
Block 5, CLIFTON, KARACHI
? subway@mail.ica.net

Nederlando :

s Peter DAVIDSE, van Diemenstraat 26 H,
2518 VC LA HAYE
? Peter.Davidse@laposte.net

Peruo :

s Yen CAMPOS CUADRO Peru Humano
URB. LADERAS DEL NORTE 0-7
CHIMBOTE
? peruhumano@hotmail.com

Pollando :

s Ireneo WILCZYNSKI, 78/155 ul.
Malczewskiego PL 80-107 GDANSK

Rumanio :

s Dorin HEHN, Str A. Saguna, A4, Ap.4,
RO 1900, TIMISOARA
? dohehn@yahoo.com

Rusio :

s Georguy GONTCHAROV,
Apt 307, Oulitsa Tvardovskovo,31,
MOSCOU

Senegalio :

s CITOYENS DU MONDE,
s/c Landing NIASSY,
BP 20336, DAKAR-THIAROYE
? landingniassy@yahoo.fr

Svedio :

s Gunnar EKEGARD,
PO.Box 1213, SE 751 42 UPPSALA
? lars-gunnar.ekgard@bredband.net

Svislando :

s Michaël EHINGER
Dorfstrasse 17
CH 3083 TRIMSTEIN
? citoyensdumondesuisse@yahoo.fr

s Citoyens du Monde,
Case Postale, CH 1038 BERCHER
? claudinefis@bluewin.ch

Sirio :

s Eric SAUVAT, PO box 3445, HOMS
? chevrier33@hotmail.com

Tanzanio :

s Janet MUKIMBILI, c/o KARADEA,
Box 99, Karagwe, KAGERA
? chema@africaonline.co.tz

Togolando :

s François TETE, BP 13260, LOME
? agbedoumassifr@yahoo.fr

Internacia Centro :

s Citoyens du Monde,
66 boulevard Vincent Auriol, 75013
PARIS (France)
? abc@recim.org

Esperantista Internacia Centro :

s Geneviève Charpentier,
32-c rue Jean Perrin, FR 77190
DAMMARIE LES LYS (France)

(situacio je la 31a de majo 2006)

Registrolibro de la Mondcivitanoj**NOVAĴOJ EL LA REGISTROCENTROJ KAJ KORESPONDANTOJ**

Tie ĉi ni donas kelkajn novaĵojn el la Registrocentroj kaj Registrolibraj Korespondantoj. Ni ne sciis nek povus prezenti kompletan tabelon de la agadoj, tiom ili multas kaj postulas foje longajn preparojn. Oni pardonu al ni la forgesojn kaj la malgrandajn erarojn. Por la estontaj eldonoj, ni ŝatus ricevi prete pretajn tekstojn por tiu rubriko.

LA REGISTROCENTROJ**MISSISSAUGA (Kanado)**

La Mondcivitana Kanada Registrocentro plu estas aktiva : regulaj kunsidoj de la Administra Konsilantaro kaj monataj kunvenoj de diskutgrupo. La aktivecoj en 2005 estis relative malmultaj, ĉefe pro sanaj kialoj. La 21an de februaro 2006 Dorothea Sheasby prezentis mondcevitanecon al sesdeko da studentoj.

La Kanada Registrocentro fervoras por soleni la mondcevitaneca tagon (printempa ekvinokso, kiu estas ankaŭ tago por la forigo de la rasaj diskriminacioj, kaj ankaŭ de la internacia pacotagon (aŭtomna ekvinokso). En Mississauga, tio okazos la 25an de septembro 2006.

Notindas, en februaro 2005, la eldonado de tre bona bulteno el 30 paĝoj kun granda kvanto da humanaj kaj tutmondistaj informoj.

? World Citizens, 688 Green Meadow Crescent, MISSISSAUGA, ONTARIO L5A 2V2. Kanado. dorsheca@sympatico.ca

KALONGE-BUTWASHENGE (Kongio D.R.)

La Registrocentro de Kalonge-Butwashenge (Sud-Kivuto) montriĝis tre aktiva kaj efika ekde sia fondiĝo kaj malgraŭ nenombreblaj malfacilaĵoj renkontitaj de civitanoj de malriĉa regiono, kiu penas eliri el postmilita ĥaoso : arestiĝoj, konfiskado de la veturilo, ĉiaspecaj ĉikanajoj, nesekureco, diversaj onidiroj. Sed estas energioj kaj projektoj :

« *Sensacia nia RECIM-mondo n-ro 01 pro ĝia koncizeco kaj ĉefe pro informoj, kiujn ĝi entenas. Ni deziras al ĝi bonan vivon. Tralegante ĝin ni notis tion jenan :*

s *La animantoj de la Registrocentro de Butwashenge/Kalonge bezonas pri la spertiĝo de la pli fruaj mondcevitanoj. Ni antaŭdankas Registrolibron pri la kleriga sesio pri*

mondcevitaneco, kiun ĝi planas organizi en Sud-Kivuto. Ni fieras, ke la tutmondiĝo de Kalonge instigis la deziron de mondcevitanoj en Mbanza Ngungu tutmondigi la ĉefurbon de malalta-Kongo.

Tie ĉi ni fiksis al ni kiel ĉefan celon la enregistradon de multe pli da mondcevitanoj, kaj por tio :

s *paroli pri mondcevitaneco ĉie, kie oni povas esti (ĉiu civitano estas animanto),*

s *proponi la enregistradon de la homoj, kiuj sin dediĉas en diversaj aktivecoj post kleriĝo pri civitaneco ;*

s *uzi la « Provizoran ateston de registrado » por la plej nhavaj homoj ;*

s *aranĝi mondcevitanajn renkontojn (seminarioj, sesioj) ;*

s *interveni en la lokaj kaj landaj amasmedioj. »*

Kaj prie la 27an de decembro 2005, la responsantoj de la Registrocentro aranĝis gazetprelegon en Bukavu pri tutmondiĝoj. Radio « Maendeleo » (Evoluigo), venis kaj ekde tiu tago la tutmondistoj de Kalonge ĉiuvendrede parolas ĉe la radio enkadre de la elsendaĵo « Voĉo de la junularo » por prezenti la tutmondismajn tezojn.

En 2005 la centro enregistris 18 mondcevitanojn.

Tiu agadvolvo kaj tiuj rezultatoj estas rimarkindaj kiam oni konas la etoson, kiu regas en tiu regiono : « La Mondcivitana Registrocentro de Butwashenge situas en la tutmondiĝinta teritorio de Kalonge, je 65 km okcidente de la urbo Bukavu, ĉefurbo de la provinco Sud-Kivuto, oriente de la Demokrata respubliko Kongio. La registrocentro funkciis en medio plena je malagrablaj surprizoj, kio estigis, ke la memaj celoj de la centro por la jaro 2005 ne estis ĉiuj atingitaj. Inter la konataj malagrablajoj, ni povas mencii la nesekurecon kaj la malrespekton de la homaj rajtoj. (...) Tiu nesekureco trafis la tutmondiĝintan teritorion de Kalonge, kie okazis la masakro de

la vilaĝo Tulumaba kun homoj klinge moritigitaj aŭ vivbruligitaj en siaj kabanoj. Ni ne forgesos menci la arbitrajn arestadojn far la militistoj de la landa armeo unuflanke kaj la ruandaj milicioj kaj la « Rasta » aliflanke, kiuj mortigas, disrabas, seksperfortas, ŝtelas ĉion, kio apartenas al la loĝantaro. (...) Ĉiufoje ke la Registrocentro planis laborkunsidon en Kalonge, aŭ tutmondistan vesperon, la nesekureco ekaperis (...) Ni esperas, ke la jaro 2006 donos kondiĉojn favorajn por la agadoj de la Registrocentro.

La nova direktoro de la centro estas Corneille Masirika.

? Civitanoj de la Mondo, SMAE, BP 470, CYANGUGU, Ruando.
smaesgcd@yahoo.fr

KINSHASO (Demokrata Respubliko Kongio)

La Registrocentro de Kinŝaso rekomencis siajn agadojn en novembro 2004. en marto 2005 la Registrocentro elektis novan estraron : Faustin Sheta Mikayele daŭre estas prezidanto, asociite kun Ferdinand Kinkani kaj Fortino Ndute.

? Citoyens du Monde, BP 51, Kinshasa-Limete - sheta@voila.fr

PARIZO (Francio)

La franca Mondcivitana Registrocentro denove enpresis sukcesan anoncon en la ĵurnalon « Le Monde Diplomatique ». Sume 508 mond-civitanaĵ kartoj estis liveritaj en 2005.

La jaro 2005 estis markita per malfacilaĵoj por la disdonado de la bulteno « Citoyens du Monde », kiu ne plu profitas la favorajn kondiĉojn, kiujn la Poŝto antaŭe donis. Pro neceseco la registrocentro rezignaciis plialtigi la abonon prezon kaj disdoni la bultenon nur al tiuj, kiuj specife pagis la jaran abonprezon. De 7.000 ekzempleroj (senpage senditaj) la disdonado atingis pagitajn 1500 ekzemplerojn. La ĉirkaŭ 5.500 mond-civitanoj, kiuj ne abonis (aŭ malzorge aŭ intence) ricevos jare kvarpaĝajn

informilojn entenantajn interalie « alvokon por memvolaj kontribuoj », bilancon de la agadoj faritaj dum la pasinta jaro, ktp.

La Alvoko de la artistoj estas subskribita de pli ol 150 homoj el la artista medio. Koncerto okazos la 29an de majo en Parizo por soleni la kvardekjariĝon de la alvoko de la 13. La kantistoj, kiuj partoprenos en ĝi kompreneble subskribis tiun artistan alvokon (vd RECIM-mondo n-ro 1 p. 4).

? Civitanoj de la Mondo, 15 rue Victor Duruy, 75015 PARIS. Francio

KOBE (Japanio)

La Japana Mondcivitana Registrocentro plenumas aktivecon ĉefe per leteroj kaj per la eldonado de bulteno, kiu tre regule aperas en majo kaj novembro de ĉiu jaro. Eldonita en japana kaj en angla, la bulteno traktas multajn aktualecajn problemojn laŭ la jura vidpunkto.

? World Citizens, 1.2.17 Suzurandai, Kitamachi Kita Ku, JP 651 1111
KOBE. Japanio. sueyoshi@tezukayama-u.ac.jp

ANTANANARIVO (Malagasio)

Post longa silento kaŭzita de la ekonomia kaj politika situacio, kiu skuis la landon, la malagasa mond-civitana registrocentro rekomencis siajn aktivecojn.

? CITOYENS DU MONDE Livah Rakotohasimbola Lot IVF 98 -
BEHORIRIKA ANTANANARIVO Madagascar - livaliha@yahoo.fr

HOVE (Belgio)

La flandra mond-civitana Registrocentro produktis bultenon en aprilo 2005. Sed pro la malfacileco renovigi la animan teamon de la registrocentro, Jean Verstraeten sugestis fermi tiun centron kaj konsideri lin kiel nur Registrolibran korespondanton.

LA REGISTROLIBRAJ KORESPONDANTOJ

Josep Lluís ORTEGA MATAS (Andoro) animas en angla lingvo la mond-civitanan komunumon (Community of World Citizens). La Interreta ttt-ejo entenas en la hejmpaĝo ligilon al Mondcivitana Registrolibro.

? cwc.editme.com

Christopher HAMER (Sidnejo, Aŭstralio) organizis kursojn pri tutmondismo. Tiuj 90-minutaj kursoj okazas en la Aŭstralia Instituto de Internaciaj Aferoj. Ili estas pagataj kursoj (po 30 eŭroj) profite al la loka mond-civitana asocio.

? www.worldcitizens.org.au

Fernando ELENA DIAZ estis unue tradukanto franca-hispanen por Mondcivitana Registrolibro. Ekde la komenco de la jaro, li komencis diskonigi mond-civitanecan en Hispanio. Sekve de la Ĝenerala Asembleo de Registrolibro en Parizo la 5an de marto 2006, li esploras la eblecon krei registrocentron.

Inge GRZYB kaj ŝia helpanto **Gerhard HIRSCHMANN** (el Magdeburgo, Germanio) same kiel **Barthold OLBERS** (el Hamburgo) partoprenis en kunveno organizita en Frankfurto ĉe Majno kun la estraro de Registrolibro, la 8an de majo 2005. Tiu kunveno celis alporti la necesajn klarigojn pri la sinteno de Registrolibro rilate al la multaj iniciatoj de la Mond-civitanoj : ĉiu homo, kiu sin rekonas mond-civitano estas invitata enregistriĝi en la mondan balotelektan liston zorgatan de Registrolibro, sed li plu estas libera pri sia agado individua aŭ sine de asocio libere elektita. Tiu sinteno restas fundamente la sama ekde 1949, sed ĝi konstante devas esti klarigita. Tiu renkonto en Frankfurto okazis en Esperanto kun tradukado en germanan fare de Gerhard Hirschmann.

Fine de majo, Gerhard profitis el profesia vojaĝo en Suda Afriko por renkonti kelkajn Esperantistojn antaŭ kiuj li prelegis pri

mond-civitaneco.

? <http://www.geocities.com/weltbuergermagdeburg>

Ivanka STOYANOVA estas korespondantino de Registrolibro en Varna (Bulgario) ekde junio 2005. La dokumentoj pri mond-civitaneco ankoraŭ ne ekzistas en bulgara. Tio neniel gravas, ĉar Ivanka jam konvinkis multajn esperantistojn enregistriĝi kiel mond-civitanoj, kaj ne nur en Bulgario.

Ursula GRATTAPAGLIA profitis el la Internacia Rotaria Kongreso en Kobe (Japanio) printempe de 2005 por varbi pri Esperanto sed ankaŭ pri mond-civitaneco. Tamen, la projekto de renkonto kun la responsantoj de la japana Registrocentro ne povis okazi. Kelkaj monatojn poste, la esperantistaj mond-civitanoj retrovis Ursula en Vilniuso en la Universala Kongreso de Esperanto, kie ŝi lastminute anstataŭis Geneviève Charpentier en ŝia prelego pri mond-civitaneco.

En Alta Paraizo, Ursula multe esperas pri la reintegrigo de Registrolibro inter la NŜO-jn ligitajn al UNESKO por malfermi mond-civitanan registrocentron en la UNESKO-domo de tiu urbo.

Yen CAMPOS CUAODRO (Chimbote, Peruo) provas diskonigi mond-civitanecan, sed la tiea medio ne estas multe favora. Eble la argumentoj estus pli konkretaj tra la instalo de evoluiga projekto. Necesas diri ankaŭ, ke malgraŭ la bonvolo de la tradukantoj, ni havas kelkajn komunikajn malfacilaĵojn, kiuj malrapidigas la evoluon de la rilatoj.

Ireneo WILCZYNSKI (Gdansko, Pollando) verkis plurajn artikolojn en la asocia bulteno ; li prezentis la mond-civitanecan dum pluraj kunvenoj en Gdansk, Gdynia, Pelplin kaj zorgas rilatojn kun diversaj esperantistaj asocioj aŭ elstaruloj en Pollando.

Dorin HEHN (Timisoara, Rumanio) tradukis en rumanan kelkajn paĝojn de la ttt-ejo « recim.org ». Li planas traduki la bultenojn RECIM-info. Li sin pretigas prezenti, fine de marto 2006, mondcivitaneco al aŭskultantaro de 450 studentoj el kvar diversaj ŝtatanecoj en la universitato de Timisoara.

Mato SPEKULJAK (Zagrebo, Kroatio) tre forte komencis la jaron 2005 kreante interretan ttt-ejon dediĉitan al la mondcivitaneco, kaj eldonante unuan bultenon en kroata lingvo pri mondcivitaneco. Plie, li konsentis lanĉi amikecan reton inter mondcivitanoj, en kiun cento da homoj enskribiĝis. Li ankaŭ invitis la kroatajn mondcivitanojn kaj la esperantistajn mondcivitanojn en internacia renkontiĝo dum la somero 2005 ĉe Adriatiko, sed la malmulteco de respondoj kaj diversaj aliaj problemoj senkuraĝigis lin kaj li decidis reŝanĝi ĉion. Nun li deziras rekomenci sian oficon de Korespondanto de Registrolibro, sed integrante ĝin en pli ampleksan edukon kaj kulturan asocion.

Jean VERSTRAETEN (Hove, Belgio) de longe klopodas en lukto kontraŭ metodoj de mensa manipulado, sed ankaŭ kontraŭ la plej lastmomenta eltrovaĵo inter tiuj, kiuj atencas kontraŭ la privata homa vivo : la instalado de sub-haŭtaj cimoj ! Regule Jean publikigas dokumentojn argumentitajn laŭ tutmondista vidpunkto. Eble ni eldonos artikolon pri tio en estonta numero. De nun, oni povas skribi al Jean, kiu trovos sian plezuron adresante la fruktojn de sia laboro.

En Kindu (Maniema, interna provinco en oriento de Kongio) **Urbain KAPOKO SUMAILI** estis kunfondinto kaj animanto de la asocio « Amikoj de Desmond Tutu ». Tiu asocio ĵus aliĝis al ASKOP (Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj). Urbain disdonis plurajn centojn da flugfolioj pri Mondcivitanoj tra la urbo Kindu kaj grupo de dudeko da homoj foje kunvenas por babilo pri mondcivitaneco.

Okcidente de tiu sama lando, en la provinco malalta-Kongo, **Elvis MBIYA TEKADIOMONA** post sukceso en la tutmondiĝo de la provinca ĉefurbo Mbanza Ngungu, provas nun interligi la tutmondiĝintajn urbojn. Ekde la komenco de la jaro 2006 li jam sukcesis enregistri 26 homojn kiel mondcivitanojn, kaj li prognozas, ke tiu fluo daŭros la tutan jaron. Li ŝatus, ke lia korespondanta ofico estu transprenita tiel rapide kiel eble de vera Registrocentro.

En Alĝerio, **Rabah BENDALI**, publika skribisto en Bejaia faris dum la jaro 2005 mirigan laboron, kiu atingis la enregistradon de 75 mondcivitanoj kaj la disdonon de pli ol 250 provizoraj atestoj de registrado.

En Souk Ahras la rezultatoj de **Khemisti BECHAIRIA** estas pli modestaj : manpleno da enregistriĝoj. Dum la jaro 2005 Khemisti ekkontaktis la aliajn Alĝeriajn Registrolibrajn Korespondantojn por proponi al ili konsistigi landan registrocentron. Eble la ideo voĵumos dum la jaro 2006.

Karl A.Y.KPODO (Accra, Ganao) diras sin nekontenta pri la progreso de tutmondismo en sia lando. Unu el la klarigoj, kiujn li donas, estas, ke la situacio, kiu regas en proksima Eburio evidencigas naciismajn sentojn ambaŭflanke de la landlimo, ĉar la loĝantaroj estas la samaj. Naciismo, sed ankaŭ rankoro kontraŭ Francio pri kiu multaj homoj havas multajn demandojn pri ĝia reala misio en Eburio.

Ĉar Registrolibro havas sian sidejon en Francio, tio eksplikus kelkajn maloportunajn mikskonfuzojn.

Kuraĝigite pro sia elekto en la Administra Konsilantaro de Registrolibro, **Karl KPODO** proponis al la afrikaj responsantoj de enregistrado (centroj kaj korespondantoj) krei afrikan reton de Registrolibro. Sekvinda ideo.

Patrice LOVESSE estas freŝdata korespondanto de Registrolibro en Bohicon, urbo tuŝanta Abomey historian ĉefurbon de « Dahomey ». Tie Patrice regas la klerigan centron por evoluigo, BCEBI. Tial li disponas relative facile pri logistikaj rimedoj por la organizado de kunvenoj aŭ seminarioj. Projekto estas kuranta por la organizado de Seminario de Tutmondismaj Studoj en kadre de ASKOP, al kiu BCEBI aliĝis.

Moussa DENA estas korespondanto de Registrolibro en Bamako ekde aprilo 2005. Tuj li volis organizi informkunvenojn, sed li rapide frontis kontraŭ manko da monaj rimedoj. Esti plena je bonvolo ne sufiĉas, kiam mankas mono. La Monda Sociala Forumo okazinta en Bamako en januaro 2006 donis al li bonegan okazon de renkontoj kaj informado. Registrolibro estis deleginta Didier Coeurnelle por reprezenti ĝin en la Forumo, kaj unu monaton antaŭe ni sendis al Moussa plurajn centojn da flugfolioj per poŝto. Perdita poŝtaĵo !

Michelet MICHEL, korespondanto de Registrolibro en Petionville (Haitio) ekde majo 2005 opinias, ke la mesaĝo pri mondcivitaneco estos bone komprenita de multaj samlandanoj, sed en 2005 la relative streĉa etoso pro la balotelekta kampanjo instigis lin al singardemo.

Francdevena, edziniĝinta kun Irlandano, **Florence LOCHRIN-CUSSON** fariĝis korespondantino de Registrolibro en januaro 2005. Patrino de junaj infanoj florence ne havas multan eblecon surloke aktiviĝi, tial ŝi laboras ĉefe per Interreto. Ĉar ŝi ricevis klerigon pri komunikado ŝi sin devontigis en la refarado de la ttt-ejo « recim.org » kunlabore kun Thibault Carrier, studento pri informadiko, kaj kun la estraro de Registrolibro.

Michaël EHINGER estas korespondanto de Registrolibro ekde januaro 2006. Li transprenas la torĉon de **Claudius SCHAUFFLER**, kiu laboras kun ni de 1996 kaj kies mandato en la Administra Konsilantaro finiĝos en 2008. Claudius estis kreinta lokan germanlingvan mondcivitanan asocion. Michaël, kiu transprenas la sekvon ankaŭ kiel prezidanto de tiu asocio estas perfekte dulingva, iu « pluso » por estonteco. Kvankam ne aperanta en la oficiala organigramo de Registrolibro, tamen oni povas saluti la agadon de tiu asocio kontraŭ novnaziismo, kiu infektas la germanlingvan svisan junularon.

Ĉiuj ĉi novaĵoj estas nur parto el multaj agadoj faritaj tra la mondo. Dankon pro daŭra transinformado. La adresojn de ĉiuj korespondantoj oni trovu en la antaŭaj paĝoj.

21an de marto – 21an de septembro

Dufoje jare la trajektorio de la tero estigas, ke la suno troviĝas perpendikle al ekvatoro. En tiuj tagoj, dum en polusoj la suno montriĝas duoncirkle ĉe horizonto, ĉie alie lumo kaj mallumo estas perfekte samlongaj : 12 taglumaj horoj kaj 12 noktaj horoj. Ili estas printempa kaj aŭtuna ekvinoksoj. Kial ne projekcii tiun kosman egalecon sur nian civitanan vivon ? Egaleco inter homoj laŭ rajtoj kaj respondecoj, egaleco inter ĉiuj homoj malgraŭ la malsamecoj, egaleco antaŭ la leĝoj... Plurfoje en la freŝa historio kelkaj mondcivitanoj proponis, ke unu aŭ alia el tiuj datoj, aŭ ambaŭ, estus solenitaj kiel tago de la civitanoj de la Mondo, tago de monda unuiĝo, tago de agado kontraŭ la malegalaĵoj, kontraŭ maljusto, kontraŭ rasismo kaj kontraŭ ekskludo, tago dum kiu ĉiuj terloĝantoj estus invititaj pripensi pri la estonteco de la homaro kaj de la planedo. **Ĉu vi interesiĝas pri tiu temo ? Ekriatu kun ni !**

Ĉu tio ne estas ideo elvolvinda en kadre de ASKOP ?

KOMISIONO PRI TUTMONDIĜOJ

Dum la renkonto de la 12a kaj 13a de marto 2005, tiu temo estis entagordigita cele al la relanĉo de la aktiveco. La animadon plenumis Roger Winterhalter, sintezon faris Brigitte Carraz.

Unua relative negativa konstato : kompleta manko de reprezentantoj de komunumoj, malgraŭ inviteletojn ; tamen la debato estis interesa kaj ĉefe ĝi estis konstruiga.

Fakte, krom la komunumoj, povas sin deklari « civitanoj de la mondo » asocioj, homgrupoj, lernejoj, ktp.. Tiu klopodo eblas kondiĉe, ke oni sciu kapti la eventoj.

Priskribo de la nunaj procedoj estis farita :

- Ekzistas ĉarto (en kinlingva en la ttt-ejo : <http://www.recim.org/saluton.htm>). Tiu ĉarto estas adoptebla kaj ŝanĝebla kondiĉe, ke ĝi respektu la bazajn valorojn ;

- la emblemoj de tutmondiĝoj estas malsamaj laŭ la landoj. Ekzemple en Francio oni uzas la saman simbolon kiel tiun de la mondĉivitanoj, dum en Kanado oni uzas la UN-emblemoj.

- Registrolibro estas la subtenanto de la tutmondiĝoj.

Post tiuj interŝanĝoj oni diskutis pri la proponoj :

En unua tempo listo de proponoj farindaj al la tutmondiĝoj estis prezentita kaj komentita. Tiun liston oni trovas en la sekvonta paĝo.

Oni poste faris tiujn proponojn, resume :

- s Eldono de atesto oficialiganta la realigitajn tutmondiĝojn (tiu atesto restas farota) ;
- s Nomi referencan homon por ĉiu tutmondiĝinta urbo, asocio, grupo, lernejo ;
- s En kelkaj urboj sin apogi sur la ĝemelkomitatoj ;
- s Interesi la Mondan Federacion de la Ĝemelurboj – Unuiĝintaj Civitoj en nia tutmondiga klopodo ;
- s Kontakti la japanan konsilion de tutmondiĝintaj urboj
- s Restudi la tekston de la ĉarto ;
- s Sin apogi sur la iniciatoj de Jacques Lefrançois : prelegoj, akceptoj, renkontoj kun la subteno de la Kongreso de la Popoloj, de Registrolibro ;
- s Elvolvi la Interretan ilon : ekzemple kompletigi la informadon pri la mondĉivitanaj urboj per teksto pri tutmondismo ;
- s Eldoni bruŝoron pri la historio de iu tutmondiĝo (Orval 1972) propono farita de Henri Cainaud)
- s Kreado kaj starigado de Mondĉivitana monumento (maketo prezentita de Henri Cainaud) ;
- s Lanĉo de tutmondista kaj esperantista kampanjo en la tutmondiĝintaj aŭ tutmondiĝontaj urboj ;
- s Propono de kotizo laŭ la nombro de loĝantoj (por la urboj) aŭ la nombro de aliĝintoj (por la homgrupoj, asocioj) po 1 centono de eŭro.
- s Lanĉi en estonta bulteno alvokon por partopreni en la komisiono pri tutmondiĝoj. Notinde, ke la interna Registrolibra bulteno (kies nomo estus RECIM-centroj) elektis la nomon « RECIM-mondo » por pliampleksigi ĝin al la pozitivaj iniciatoj de la tutmondiĝintaj komunumoj ;
- s Notindas, ke la urbo Montpellier (Francio) sin afiŝas sub la nomo « *Montpellier, mondĉivitana urbo* ». Tamen interne de la ttt-ejo oni trovas neniun informadon pri la signifo de tiu nomo.

s Sin inspiri el la ekzemploj de agadoj farataj en Usono, tiaj :

- Ø urbodomoj por paco
- Ø sennukleaj areoj
- Ø lokoj por paco
- Ø urboj por paco
- Ø jardeko por edukado
- Ø daŭra disvolviĝo (iniciato de UNESKO)
- Ø urboj por la antaŭgardo de la klimato
- Ø kreado de Agendo-21
- Ø konsidero al la minoritatoj en la urboj (iniciato de Internacia Amnestio).

s Konsistigi interretan repertuaron kun konkretaj ekzemploj kaj plenumitaj iniciatoj.

s La debato estis instrua kaj kuraĝiga. Nun anstataŭ preparoli ni ekagu. Ni deziras, ke volontuloj sin proponu.

Sintezo farita de Brigitte Carraz.



Maketo de tutmondiĝa steleo far Henri Cainaud.

S-ro Jacques Lefrançois, delonga mondĉivitano, sukcesis havigi la tutmondiĝon de la komunumo Stabroek en 2004. Li invitis Mondĉivitanan Registrolibron partopreni en la solenado de tiu tutmondiĝo.

Tiu tago, 4an de julio, « monda tago de Unuiĝinta Naciaro por medio kaj paco en la mondo », matene komencita je 10a h kaj finita je 19a h estis tre interesa kaj instrua por ĉiuj el ni.

Ĉirkaŭ je 9 h 30 ni atingis la urbodomon kun Jacques kaj Didier kaj tiel ni havis tempon por disdoni dokumentojn al ĉiuj kaj ĉefe la liston de ideoj el tio, kion oni povas iniciati kiam komunumo estas tutmondiĝinta.

Tutmondiĝoj

Kelkaj sugestoj destinataj al la tutmondiĝintaj urboj kaj komunumoj

- s Disdonado al la loĝantaro de informoj pri la celoj kaj la rimedoj de tutmondismo kaj de Kongreso de la Popoloj.
- s Invitado al la municipoj kaj loĝantaroj por partopreni en la balotelektoj kaj subteni la elektitajn delegitojn al la Kongreso de la Popoloj.
- s Konsciigo de la loĝantaroj kaj pli aparte de la lernantoj pri la tutmondeco de la grandaj problemoj (poluado, malsato, demografio, armiloj...) (Disvolvado de la ideo de tutmonda civitismo).
- s Proponi jaran tutmondisman tagon en la lernejoj.
- s Informado al aliaj urboj aŭ komunumoj pri la celoj kaj la agado de Kongreso de la Popoloj.
- s Esplorado de la eblecoj de interŝanĝoj inter loĝantaroj de tutmondiĝintaj urboj kaj komunumoj.
- s Aranĝi turismajn vojaĝojn.
- s Kreado de regula subvencio konsentita de la tutmondiĝintaj urboj kaj komunumoj al la Kongreso de la Popoloj.
- s Materialigo de la tutmondiĝo : monumento, ŝtonoj je la enirejoj de la urbo, tutmondiĝa ĉarto afiŝita en la urbodomoj.
- s Aranĝi jaran feston pri tutmondisma temo.
- s Ĉeesto de la tutmondismaj libroj en la bibliotekoj kaj vendado en la librovendejoj de la tutmondismaj eldonaĵoj.
- s Aranĝado de renkontoj inter tutmondiĝintaj urboj kaj komunumoj dum seminarioj aŭ kongresoj
- s Esplorado de la pliampleksigo de la procezo de tutmondiĝo al landoj (komencante de malgrandaj landoj, interalie tiuj, kiuj ne havas armeon).
- s Eldonado de jara bulteno
- s Kunlaborado kun tutmondismaj organizaĵoj, interalie kun la tutmondistaj parlamentaj grupoj kaj la “Monda Konsilio de Tutmondiĝoj” en Japanio.
- s Aranĝo de jara semajnfino por ke kunfortiĝu “Interligan komitaton de tutmondiĝintaj urboj kaj komunumoj”.
- s Malfermo de Domo de Monda Civitaneco.
- s Aliĝo al Monda Solidareco kontraŭ la malsato.

Kompreneble tiu listo estas ne kompleta. Oni povas aldoni ekzemple konkurson de desegnoj, konkurson de noveloj, konkurson de poezioj (pri tutmondisma temo), ellason de balonoj, ktp. kaj ĉion imageblan.

Je 10a post enkonduko de S-ro Alphonse Mees, mondĉivitano ekde 1972, S-ro urbestro Alex Bastianssens intervenis por danki S-ron Lefrançois kaj tiujn kiuj per sia ĉeesto aŭ sia mesaĝo subtenis tiun iniciaton. Poste Liliane Metz-Krencker legis la mesaĝon senditan de Roger Winterhalter, prezidanto de Kongreso de la Popoloj kaj prezidanto de la komisiono pri tutmondiĝoj.

Amikeca trinkado sekvis kaj malgraŭ kelkaj malgrandaj lingvaj problemoj, el kiuj ĉiuj elturniĝis uzante aliajn lingvojn kaj eĉ Esperanton, ĉiuj povis mondĉivitane komuniki.

Poste Jacques Lefrançois dankis la tutan municipon pro ties engaĝiĝo kaj subteno al la urbestro pro ties elekto. Li parolis al li pri la estontaj tutmondiĝoj realigitaj ĉirkaŭ Stabroek kaj pri la helpo, kiun la freŝe tutmondiĝinta urbo povus doni al tio.

Ni notis la partoprenon de kelkaj delongaj mondĉivitanoj, kies ĉeesto bone demonstris, ke ilia idealismo neniel ŝanĝiĝis. Jacques Lefrançois proponis al ili resti en kontakto kun li « por plifortigi la vicojn de tutmondismo kaj la esperon de universala paco ». Ĉeestis : Jaky Lefrançois el Mortsel, Fernand Thibault el Marcinelle, Stella De Weerd kaj Roger Torremans el Stabroek, François Duerinck Kontich kaj Didier Coeurnelle el Bruselo, Greta Dielens el Antverpeno kaj multaj aliaj.

La mondĉivitana grupo poste iris kun Alphonse Mees viziti la malgrandajn komunumojn Lillo kaj Doel. Tiuj lokoj, proksimaj al la haveno de Antverpeno estas mortminacataj pro grava programo de transformado de la haveno. La historiajn heredaĵojn de Lillo oni povis savi dank'al la asocio prezidata de Alphonse Mees, sed ne estas same pri Doel, kiu estos foroferita al la pligrandigo de la Antverpena haveno, kiu per tio superos la kapablojn de la havenoj de Honkongo kaj Singaporo ... krom se tiu faraona projekto estos forlasita. Doel devus tutmondiĝi antaŭ ol morti kaj tiamaniere fariĝi ekzemplo pri la misefikoj de la homa stulteco. Ĝi sendube ne estas la nura komunumo, kiu suferas tian sorton.

Dum tagmanĝo Didier kaj Liliane ekhavis ideon krei ttt-ejon de la tutmondiĝintaj urboj, kie ili povus havi rilatojn kaj interŝanĝi ideojn.

Liliane Metz-Krencker



SEMINARIOJ DE TUTMONDISMAJ STUDIOJ

Mondcivitana Registrolibro proponas novan formulon de surloka kleriĝo, laŭmende adaptebla, kiel eble plej malmultekosta.

Loko : ĉie en la mondo

Partoprenantaro : inter 15 kaj 50 homoj

Daŭro : de du tagoj ĝis unu semajno

Momento : en ĉiuj periodoj de la jaro, kondiĉe ke la aferoj estu aranĝitaj almenaŭ tri monatojn antaŭ la planita dato.

Invitado : lanĉita de la organizanto al landa nivelo, kaj de ASCOP al internacia nivelo.

Enteno : Ĉiuj eblaj temoj rilataj al tutmondismo, konsiderante la lokan mendon kaj la lokajn spertulojn.

La spertuloj kaj animantoj estas planitaj de la organizanto je landa nivelo kaj de ASKOP por la eksterlanda kontribuo.

Ĝenerala kadro de ASKOP.

La seminarioj havas kiel ĝeneralan kadron ASKOP, kiu havas gamon da homaj, financaj, kaj materialaj kapabloj, da agado kaj pripensado multe pli ampleksa ol la simpla "enregistrado" (Mondcivitana Registrolibro). Ĉiu organizaĵo membro de ASKOP povas fariĝi organizanto de seminario.

La kondiĉaro kaj la buĝeta gvidilo estas tiuj de ASKOP. Kompletigoj kaj adaptigoj povos esti sugestitaj laŭ la spertiĝo.

Kultura enradikiĝo

Por seminario okazonta ekster Eŭropo, ne temos pri eksportado de la nocio de monda civitaneco tia, kia ĝi estas komprenita en Eŭropo, sed pri konstato de enradikiĝo de tiu civitaneco en la loka tradicio. « Mi estas civitano de la mondo ĉar parto de la tradicio pretigis min al tiu spiritostato ». Igrade ĝi estas veto, kiu efektiviĝos laŭ la cirkonstancoj kaj la kvalito de la homoj koncernataj. Oni povas imagi ian bibliotekon de la universalista penso de ĉiu kulturo. Oni povas inviti la organizanton de seminario al antaŭa laboro en tiu senco. Kompreneble la priaj kontribuoj estos ankoraŭ fareblaj post la seminario.

ORGANIZAJ KONDIĈOJ

Antaŭ la seminario

Konsistigo de dosiero de buĝeta antaŭvido konforma al la Regularo de ASKOP kaj al la Kondiĉaro (www.recim.org/ascop/). Post konsento de ASKOP la organizanto pretigas :

Ø **memorigilon de animado**, kiu inkluzivu ankaŭ la medion de la kleriĝo.

Ø **inversan kalendaron** rememorigantan ĉiujn operaciojn farendajn laŭdate, ekzemple : kontrolo, ke almenaŭ dek kvin homoj estas interesataj ; eltrovo de financado, eltrovo de ĉambro, de gastejo kaj de manĝoj. Instalado de specifa sekretariejo kaj kontolibro. Eltrovo de animantoj, de spertuloj, de elstaruloj. Organizado de la transportoj. Regula informado (semajna) al ASKOP pri la progreso de la projekto. Dissendado de la invitiloj je landa nivelo. Sendado de gazetdosieroj al la loka amaskomunikilaro. Kontrolo de la ĉambro kaj de la materialo (tabulo, skribiloj, papero, trinkaĵoj...) Akceptado. Ktp.

Ø Por ĉiu instruparto, necesos provizi :

s dokumenton prezentantaj la seminarion : ties celo, enteno, elvolvo, kaj esperataj rezultatoj.

s programon de animado, kiu inkluzivu la mesaĝojn transdonendajn, sed ankaŭ intensan partoprenon de la staĝantoj

kaj la celatajn rezultatojn.

s subtenilojn de animado, kiu povos esti fotokopiitaj libretoj aŭ informadikaj dosieroj, sed ankaŭ prezentaĵoj sur papertabulo, aŭ projekcieblaj dokumentoj, ktp. laŭ la rimedoj.

s la eventualajn dokumentojn por la staĝantoj, originalajn aŭ reproduktotajn de la organizanto.

Dum la seminario

La animado

Preferindas, ke la ĉefa animado de seminario estu farita de ununura homo, responsanto pri la mesaĝo, pri la atingendaj rezultatoj kaj pri la uzata metodo.

Tiu animanto povas esti unu el la membroj de la organiza komitato aŭ esti provizita de ASKOP ;

Preferindas, ke tiu ĉefa animanto estu helpata de iu, kiu jam iam konas la temon kaj loĝas en la regiono. La animado tiel estas pli vigla kaj la aktiva partoprenado de la staĝantoj pli bone certigata kaj pli bone konsiderata.

La interveno de responsanto de tutmondista organizaĵo, je malfermo kaj je fermo aŭ pri difinita temo de la seminario estas rekomendebla.

Fine la veno de fama homo jam konata de la gazetaro aŭ de loka famulo, kapabla alporti sian kontribuon en la kadro de la seminario kaj tamen ne ĝenante la instruadon, kompreneble estas pluso.

Post la seminario

Necesas, ke la ĉefa animanto faru raporton pri la elvolvado de la seminario, pri ties etoso, pri la grado de partoprenado kaj de kontentiĝo de la staĝantoj kaj pri la instruaj konkludon, kiuj ŝajnas al li interesaj.

La pluzorgado de la animado.

La pluzorgado de ĉiu seminario

Estus bedaŭrinde, ke tia investo estus entute aŭ parte perdita.

Laŭ la propraj celoj de ĉiu seminario, antaŭ la fermo ĉiu partoprenanto sin esprimu pri la maniero per kiu li deziras ellabori ĝian entenon.

Tial necesus antaŭvidi, ke en difinita tempo la staĝinto faru raporton pri sia agado al la animanto aŭ al ASKOP. Tio donus pli da graveco al la formado kaj plifortigus la ligojn de la organizaĵo.

La pluzorgado de ĉiuj seminarioj

La analizo de la seminarioj raportoj ebligos kontroli la trafekon de tiuj lastaj rilate kun la celoj, evoluigi ilin, krei novajn aŭ nuligi kelkajn.

DISFAMIGO

s Krom la kleriĝo de la staĝantoj tiu seminarioj povas esti la okazo de komunikaĵoj al la lokaj amaskomunikiloj, por ke ili reeĥu ilin kaj pri mond-civitaneco kaj pri la kleriga programo mem.

s Krom por la unua seminario, ASKOP povos helpi la organizanton provizante ĝin per gazetdosieroj.

s La partopreno de lokaj gazete famaj homoj, taŭgaj kun la bildo de ASKOP prezentas grandan intereson kaj por la staĝantoj kaj por diskonigi la seminariojn.

s La kvalito de la organizoj, kiuj finance apogas la seminarion, povas helpi al ties mediatigo same kiel tiu mediatigo povas esti pluso por la patronoj.

s ASKOP estu antaŭe informita pri la elekto de la famuloj kaj de la patronoj.

s La raporto pri la seminario devos enteni la lokan efikon de la seminario.

Financado

Ju pli malaltaj estos la preparaj kostoj de la seminario, despli grava estus la partoprenado. Nu, eĉ striktaj tiuj seminarioj havas kostojn : organizado, komunikado, eventuala transporto kaj gastigado de la animantoj kaj intervenantoj, ktp.

Do la organizanto havas la taskon eltrovi unu aŭ plurajn organizojn kapablajn helpi ĝin materiale aŭ finance.

LA ENTENO

Neniam tiom multe temis pri tutmondiĝo. Neniam estis tiel evidente, ke la grandaj ekonomiaj, financaj, socialaj, politikaj, sanaj, kulturaj, etikaj, sekurecaj, mediaj ... problemoj, kiuj akre staras, havas sian devenon en la tutmonda interdependeco.

Kaj tiu tutmonda karaktero naskas senton de nepovo, de vundebleco kaj de malespero.

Pro diversaj kialoj, kiun oni devos konsideri, la tamen racia solvo de tutmonda reĝeco ankoraŭ trudiĝas nek kurtatempe, nek mezatempe, eĉ nek longatempe, spite al ĝia elvokado far pli kaj pli da ĉiuspecaj organizoj kaj homoj.

Nu tute kompreneble ni estas konvinkitaj, ke la taŭga respondo pasas tra mondcivitaneco, kaj ke necesas diskonigi ĝin.

En tiu kunteksto kaj favora kaj obstrukcata, por fariĝi aŭdebla la respondo de la mondcivitaneco devas esti esprimita en sia tuta riĉeco, donanta mirindan idealon, sed ankaŭ realista kaj saĝa ; montri la celon, indiki la vojojn ne kaŝante la obstaklojn.

Jen kion oni devos transdoni en tiu klerigado :

s entuziasmiga idealo : voli harmonie kunvivi ĉiuj kune sur tiu tero, respektante la medion ;

s tre konkreta ekstraktado : la demonstrado pri la neceseco kaj pri la realismo de tia celo, kun la vojoj por atingi ĝin, ekster ĉia partia ideologio ;

s praktikaj agadoj tuj ellaboreblaj, interalie por ekinformi la publikan opinion, kaj daŭrigotaj.

Necesos enradikigi tiun projekton en la komenca impulso de la fondintoj, fiksi ĝin en nia tutmondiĝinta nuna realeco, tamen malfermante ĝin al la neprognozeblecoj de estonteco.

La ĝeneralaj aŭ fakaj instrupartoj devas disdoni tiun mesaĝon, sed ankaŭ lasi larĝan spacon al esprimo kaj al maturiĝo de la partoprenantoj, por ke ili alproprigu al si la entenon kaj ekdeziru diskonigi ĝin ĉirkaŭ si.

... tamen zorgante, ke ĝi estu senŝanĝa.

Klerigo de spertuloj

Plejparto de la subteniloj estu utiligeblaj de la staĝintoj mem en sia propra medio.

Sendube estos utile, ke oni planu seminariojn por klerigo al animado, aŭ instrupartojn rezervitajn al tio.

Oni ankaŭ antaŭvidas, ke la aktivaj tutmondistoj, kiuj estos partoprenintaj en pluraj seminarioj povos mem esti integritaj en la spertulan teamon, rajtigataj por transdoni la tutmondisman instruadon.

Jean-Jacques Cozzari kaj Daniel Durand

SEMINARIO DE TUTMONDISMAJ STUDIOJ EN BENINO

BCEBI (Benina Centro por la Evoluigo de la Bazaj Iniciatoj) organizas SEMINARION DE TUTMONDISMAJ STUDIOJ en Bohicon, urbo tuŝanta la historian ĉefurbon Abomey,

De la 6a ĝis la 8a de oktobro 2006

Por 15 ĝis 50 homoj

Programo :

- a- Tradicioj, kulturoj, benina demokratio, okcidentafrikaj demokratioj, homaj rajtoj kaj devoj ;
- b- Benina demokratio – okcidentafrikaj demokratioj : Ĉu oni povas inspiriĝi per ili por aktiveco al tutmonda demokratio ?
- c- Kio devas esti UN kaj ties internaciaj institucioj por instali veran

mondan demokration ?

d- Nunaj civitanaj iniciatoj al monda solidareco kaj al monda demokratio

Aliĝa kosto :

- a- Beninano : 30.000 CFA F
- b- Afrikano : 40.000 CFA F
- c- aliaj devenoj : 100 €

Ĉiuj praktikaj informoj por aliĝi kaj la restadaj kondiĉoj estas konsulteblaj en <http://www.recim.org/ascop/pr06-eo.htm>
BCEBI/CBDIBA, BP 256, BOHICON (Benino)
cbdiba@intent.bj

El la kalendaro :

s 23an ĝis 28a de julio : Somera universitato de tutmondismo en Ĉaŭdefono (Svisio)
? Kultura Centro Esperantista , PF 311, CH 2301 La Chaŭ de Fonds (Svisio) kce.esperanto@bluewin.ch

s 29an de julio ĝis 5a de aŭgusto : Universala Kongreso en Florenco (Italio)

s 22an ĝis 25a de aŭgusto : 28a sesio de Instituto de Tutmondismaj Studoj en Eben-Emael (Belgio)

s 6an ĝis 8a de oktobro : Seminario de Tutmondismaj Studoj en Bohicon (Benino)

s 4an de novembro 2006 : Kunveno de la balotelekta kontrolkomisiono de Kongreso de la Popoloj (en Parizo)

s 8an ĝis 12an de decembro : tutmondista simpozio en Lucknow (Hindio)

s Ĉirkaŭ la 21a de marto 2007 : lanĉo de la balotelektoj en Magdeburg okaze de la mondcivitana tago (printempa ekvinokso).

RECIM-Mondo estas eldonaĵo de Registrolibro de la Mondcivitanoj. La servo estas dirata senpaga. Tamen Registrolibro akceptas ĉiujn memvolajn kontribuojn : per monbiletoj, mandatoj aŭ per poŝta ĝiro al : CCP PARIS 2848 94 Y je la ordo de Registre des Citoyens du Monde.

IBAN : FR 46 30041 00001 0284894Y020 02 - Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR

UEA-kodo : **mciv-a** (Internacia Registrolibro de Mondcivitanoj)